Svisa Esperanto-Societo

# informas

SES informas Septembro 2020

## Svisaj Esperanto-Tagoj en Zuriko
## kaj ĝenerala kunveno de Svisa Esperanto-Societo
## 17an kaj 18 de oktobro 2020
## en Centro Karolo la Granda (Karl der Grosse)
## Kirchgasse 10 (apud Granda Monaĥejo)

Fine post korona paŭzo ni povas denove fizike renkontiĝi, sed tamen kun necesa prudento kaj en iom pli modesta kadro ol origine en majo planite, do nur 2 anstataŭ origine dum 4 tagoj. Ni ĝojas renkontiĝi kun vi en Zuriko!


Granda Monaĥejo Zuriko


Centro Karolo la Granda

*Atentu: Pro la nuna koronvirusa situacio via ĝustatempa aliĝo al la Esperanto-Tagoj kaj la ĝenerala kunveno ĝis plej malfrue la 12a de oktobro estas nepre necesa!*

*(Aliĝilo sur paĝo 3, sendu vian aliĝon al ses-informas@esperanto.ch)*

# Svisaj Esperanto-Tagoj – programo

## Sabaton 17an de oktobro 2020

09h00 (Centro Karolo la Granda)
Alveno, registrado, salutado, kafo
10h00 Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo
[Tagordon vidu paĝo 4]
12h30 Tagmanĝo
(La menuo estas Supo, Miksita salato, Legom-Viando-Torto [tiel nomita kiŝo] aŭ por veganoj, sandviĉo kaj trinkaĵoj)
14h00 Teatraĵo/Vivsonludo de Lyraysy (Linda Weidmann):
„La malpermesita kristnasko“
(Vi estas kondukita al Venecio en de la jaro 1615)
Praprezentado en Esperanto
15h00 Kafo- kaj babilpaŭzo
16h00 Prezentado de la gajnintoj de la Svisa Esperanto-Etfilmkonkurso
18h00 Vespermanĝo
Fromaĝo kaj viandoplado aŭ por veganoj sandviĉo kaj trinkaĵoj
20h00 Vespera programo:
Memoro pri Hector Hodler cent jarojn post lia forpaso
(1an de oktobro 1887 – 31a de marto 1920)
Lingvaj ludoj kaj prezentado de projektoj.

## Dimanĉon 18an de oktobro 2020

09h15 Kolektiĝo antaŭ la Centro Karolo la Granda
09h30 Ĉiĉeronado tra la malnova urbo de Zuriko
fare de Dietrich Michel Weidmann
13h00 Adiaŭado antaŭ la nacia muzeo apud la ĉefstacidomo
14h00 Vizito de la Zurika Bestoĝardeno (eniro Fr. 28.- pagata individue).

*Atentu: Ni atentigas, ke laŭ la reguloj de la Kantono Zuriko pro la koronvirusaj protektodevoj la surmeto de maskoj en la salono estas deviga krom dum manĝado kaj por personoj, kiuj pro sanaj kialoj estas liberigitaj de maskouzado. (Se iu bezonos, SES vendos maskojn ĉe la akceptejo.) – Same aliĝo estas deviga.*

## Aliĝilo por la Svisaj Esperanto-Tagoj 17/18an de oktobro 2020

(Ĉiu individuo devas plenigi apartan aliĝilon. Sendu vian aliĝilon ĝis plej malfrue la 12a de oktobro 2020 retpoŝte al ses-informas@esperanto.ch aŭ poŝte al
Esperanto-Societo Zuriko, Archstr. 2, Poŝtfako 26, 8613 Uster 3)

Individua nomo: ________________ Familia nomo: ____________________

Adreso: ________________________________________________

Poŝtkodo/Loĝloko: ________/_________________________________

Redadreso: ________________ Telefonnumero: ____________________

Mi estas membro de SES aŭ de ESZ: Jes: ☐; Ne: ☐

(Faru hokon ☑, se validas). Mi aliĝas al:

☐ Ĝenerala kunveno (senpage aliĝo tamen necesa!)
☐ Tagmanĝo sabaton 17an de oktoboro, kostoj: CHF 24.-
☐ Al la kultura programo la 17an de oktobro, kotizo: CHF 35.-
(por membroj des SES aŭ ESZ kaj junuloj ĝis 25 CHF 25.-)
☐ Vespermanĝo sabaton 17an de oktobro, kostoj: CHF 17.-
☐ Ĉiceronado, dimanĉon 18an de oktobro (senpage)
☐ Vizito al la Zurika Bestoĝardeno (eniro CHF 28.- pagenda surloke + trambileto, se vi ne havas trafikabonon)

Atentu: ***La aliĝo estas pro la koronvirusaj protekto-aranĝoj nepre deviga***, kaj aliĝinto, kiu ne venas tamen ŝuldas la kotizojn kaj kostojn por la manĝo, ĉar ni tion ja devas mendi anticipe kaj pagi. Dankon por via kompreno. Bonvolu pagi vian kotizon kaj viajn manĝojn se eblas, anticipe al la konto de
Amikaro Esperantista, 8610 Uster: **IBAN CH63 0900 0000 9001 2622 6**

(prefere utiligu por la aliĝo la ligilon en la Svisa Kalendaro: www.esperanto.ch/kalendaro)

[Post la ricevo de via aliĝilo SES sendas al vi fakturon laŭ viaj mendoj kun la peto pri anticipa pagado. Kun la fakturo kaj aliĝkonfirmo SES sendos al vi ankaŭ liston kun hoteloj, se vi deziras tranoktadon, ni petas vin mem aranĝi vian restadon.]

# Tagordo de la ĝenerala kunveno 2020
# Sabaton, 17an de oktobro 2020, 10h00
# Centro Karolo la Granda, Zuriko

1. Bonvenigo, kontrolo de ĉeestantoj kaj anonco pri senkulpiĝoj.
2. Aprobo de la tagordo.
3. Elekto de protokolanto
4. Elekto de voĉnombrantoj
5. Evoluo de la membraro.
6. Aprobo de la protokolo de la ĝenerala kunveno 2019
7. Vivo de la societo : aprobo de la estrarraporto
8. Financoj. Prezento jarkalkulo 2019 kaj aprobo
9. Elekto de la estraro
10. Elekto de kaskontrolantoj
11. Elekto de honoraj membroj de SES.
12. Proponoj de membroj
13. Projektoj por 2020/2021
14. Fikso de la loko por la ĝenerala kunveno 2021
15. Nia retejo, nia voĉo.
16. Buĝeto 2021 Prezento kaj aprobo.
17. Diversaĵoj

Membroj rajtas submeti proponojn por diskuto kaj decido dum la ĝenerala kunveno, se tiuj havas la subtenon de almenaŭ tri membroj. Tiaj proponoj devus atingi la estraron ĝis plej malfrue la 1an de oktobro (retpoŝte al ses@esperanto.ch). Ni publikigos la definitivan tagordon la 3an de oktobro en nia retejo (svisa-esperanto-societo.ch).

# Bilanco 31.12.2019

| | | Bilanco 31.12.2019 |
|---|---|---|
| **1010** | Poŝtkonto (17-581 908-4) | 5 829,88 |
| **1011** | Poŝtŝparkonto (92-7737-1) | 21 486,05 |
| **1012** | Librokonto (14-893 808-5) | 1 080,96 |
| **1090** | UEA konto sesa-v (90.04 eur je 1.0855) | 97,74 |
| **1100** | Inventaro | 1,00 |
| **1110** | Inventaro Novaj Libroj (La Birdoj 163; Sonril-Urĉjo 588, Fahrtrichtung Esperanto 160) | 5 502,60 |
| **1310** | Akcioj de AMIKUMU (7500 AUD je 0.6787) | 5 090,25 |
| | **Aktiva sumo** | **39 088,48** |
| **2000** | Transaj pasivoj (kotizoj 2020) | 35,00 |
| **2004** | Ŝuldo Robert Walser Sculpture | 86,00 |
| **2005** | Ŝuldo Svisa Espero | 50,00 |
| **2010** | Fonduso: Muzika konkurso | 2 896,17 |
| **2020** | Fonduso: JES | 3 211,85 |
| **2030** | Fonduso: Sfero | 1 018,00 |
| **2050** | Projekto HECTOR HODLER | 2 100,00 |
| **2100** | Kapitalo 1.1.2019 31 119.60<br>Malprofito 1 428.14 | 29 691,46 |
| | **Pasiva sumo** | **39 088,48** |

SES serĉas novajn homojn, kiuj pretas dediĉi sian libertempon al la estraro de Svisa Esperanto-Societo.

La estraro atentigas, ke Dietrich Michael Weidmann anoncis sian demision kiel kunprezidanto de SES kun efiko de la ĝenerala kunveno 2020. Pro la koronaj cirkonstancoj kaj prokrastoj Dietrich Weidmann pretas plenumi sian oficon ankoraŭ ĝis la ĝenerala kunveno 2021 en Les Brenets, se ne antaŭe troviĝas persono, kiu pretas transpreni la oficon. Dietrich Weidmann atentigas, ke li pretas pretigi ankoraŭ unu eldonon de SES informas komence de 2021 kaj ankaŭ alian eldonon de Svisa Espero. Krome li pretas plu plenumi la oficon de komitatano A de UEA almenaŭ ĝis la fino de la nuna oficperiodo en 2022.

| **Jarkalkulo 2019/buĝeto 2019** | | **Jarkalkulo 2019** | **Buĝeto 2019** |
|---|---|---|---|
| **Elspezoj** | | | |
| **3000** | Informado, varbado | 254,30 | 4 000,00 |
| **3010** | Omaĝoj, laborrimedoj | 60,00 | 0,00 |
| **3020** | Subvencioj, premioj, projektoj | 686,00 | 1 000,00 |
| **3050** | Fonduso: Sfero | 1 018,00 | 0,00 |
| **3110** | Svisa Espero / SES informas | 800,00 | 3 000,00 |
| **3120** | Kunvenoj kaj kunsidoj (GK, estrara, regionaj) | 310,00 | 150,00 |
| **3200** | Kotizoj al UEA, ktp. | 354,66 | 270,00 |
| **3210** | Administrado (afrankoj, telefonkostoj, ktp) | 20,00 | 150,00 |
| **3220** | Bank- kaj poŝtspezoj kaj kurzdiferencoj | 328,98 | 400,00 |
| **3320** | Projkto HECTOR HODLER | 2 100,00 | 0,00 |
| **3330** | Libro eldonado | 0,00 | 7 000,00 |
| **3500** | Malvalorgio de la libro-stoko | 1 834,20 | 2 000,00 |
| | **Elspeza sumo** | **7 766,14** | **17 970,00** |
| **Enspezoj** | | | |
| **4200** | Membrokotizoj | 2 580,00 | 5 000,00 |
| **4210** | Abono al SESi sen membreco | 335,00 | 600,00 |
| **4300** | Donacoj, heredajhoj | 1 305,00 | 3 400,00 |
| **4500** | Vendoj Libroj | 0,00 | 2 000,00 |
| **4600** | Bank kaj poŝtinterezoj | 0,00 | 0,00 |
| **4650** | Bonhavo likvidiĝo Sfero | 1 018,00 | 0,00 |
| **4700** | Projekto HECTOR HODLER | 1 100,00 | 0,00 |
| **4800** | Diversajho Libro eldonado | 0,00 | 7 000,00 |
| | **Enspeza sumo** | **6 338,00** | **18 000,00** |
| | **Profito/Malprofito** | **-1 428,14** | **30,00** |

Atentigo: La buĝeto 2019 aperas nur informe. Ĝin ni diskutis antaŭ du jaroj. La estraro atentigas, ke la ĉefa celo de nia buĝeto estas doni al la estraro la rajton fari la necesajn elspezojn. Ĉu tiuj elspezoj efektive faritos dependas de la realigo de projektoj. La estraro ankaŭ klarigas, ke certaj elspezoj estas adaptitaj al la evoluo de la enspezoj (la buĝetado de la enspezoj ja efektive ne vere eblas, ĉar ĝi dependas de multaj eksteraj faktoroj), tiel ke la realigita malprofito ne endanĝerigu la financan povon de la asocio. Tiu koncepto klarigas la diferencon inter la buĝetaj ciferoj kaj la reala rezulto.

| **Buĝeto 2019/2020** | | **Buĝeto 2020** | **Buĝeto 2021** |
|---|---|---|---|
| **Elspezoj** | | | |
| **3000** | Informado, varbado | 1 000,00 | 2000,00 |
| **3010** | Omaĝoj, laborrimedoj | 50,00 | 100,00 |
| **3020** | Subvencioj, premioj, projektoj | 1 000,00 | 1000,00 |
| **3050** | Fonduso: Sfero | 0,00 | 0,00 |
| **3110** | Svisa Espero / SES informas | 1 000,00 | 3500,00 |
| **3120** | Kunvenoj kaj kunsidoj (GK, estrara, regionaj) | 150,00 | 500,00 |
| **3200** | Kotizoj al UEA, ktp. | 270,00 | 270,00 |
| **3210** | Administrado (afrankoj, telefonkostoj, ktp) | 150,00 | 150,00 |
| **3220** | Bank- kaj poŝtspezoj kaj kurzdiferencoj | 350,00 | 350,00 |
| **3320** | Projkto HECTOR HODLER | 0,00 | 0,00 |
| **3330** | Libro eldonado | 0,00 | 0,00 |
| **3500** | Malvalorgio de la libro-stoko | 2 000,00 | 1000,00 |
| | **Elspeza sumo** | **5 970,00** | **8870** |
| **Enspezoj** | | | |
| **4200** | Membrokotizoj | 4 135,00 | 4900,00 |
| **4210** | Abono al SESi sen membreco | 330,00 | 330,00 |
| **4300** | Donacoj, heredajhoj | 1 300,00 | 2500,00 |
| **4500** | Vendoj Libroj | 500,00 | 1200,00 |
| **4600** | Bank kaj poŝtinterezoj | 0,00 | 0,00 |
| **4650** | Bonhavo likvidiĝo Sfero | 0,00 | 0,00 |
| **4700** | Projekto HECTOR HODLER | 0,00 | 0,00 |
| **4800** | Diversajho Libro eldonado | 0,00 | 0,00 |
| | **Enspeza sumo** | **6 265,00** | **8930** |
| | **Profito/Malprofito** | **-295,00** | **+60** |

Pri la buĝeto 2020 ni decidis en 2019, se neniu en formo de formala propono ĝis la 1-a de oktobro postulas modifojn por la kuranta jaro, pri tiu ni ne plu devas diskuti.
Laŭ la ĝisnuna evoluo el financa vidpunkto la kuranta jaro 2020 generas profiton por la jarkalkulo 2020 ŝuldata al kresko de enspezoj unuflanke kaj neaperigo de Svisa Espero dum la kuranta jaro.
Rilate Svisan Esperon la propono estas aperigi unuopan numeron komence de 2021. Por tiu eldono de Svisa Espero estu disponigitaj CHF 2500.- por la produktado de la revuo mem kaj CHF 1400 por la dissendado al politikistoj el la varbada konto.

# Esperanto-Vivo 2019 en Svislando – resuma raporto de la estraro

Ne eblas ĉi-tie raporto detale, pri ĉio, kio okazis en 2019 en la Esperanto-movado en Svislando. Ni mencias ĉi-tie nur la ĉefajn aktivecojn kaj kelkajn gravajn eventojn de la lokaj grupoj kaj aktivuloj. Konsiderante, ke ni devis pro la korono-krizo ŝovi nian ĝeneralan kunvenon preskaŭ al la fino de la jaro, ni tuŝas ankaŭ la evoluon pro la korona paralizo de ĉiuj publikaj aktivecoj.

## Svisaj Esperanto-Tagoj en Tiĉino

La 4an kaj 5an de majo SES renkontiĝis en la tiĉina ĉefurbo Belinzono kaj en ties kadro okazigis sian ĝeneralan kunvenon, kiun partoprenis 27 membroj.

## Studsabatoj en CDELI

Tra la tuta jaro okzais monate la tradiciaj studsabatoj en CDELI en La Chaux-de-Fonds, kiuj estas grava institucio en la kultura vivo de la sivsa Esperanto-movado.

## Robert-Valser-Skulpturo en Bielo

De la 14-a de aprilo ĝis la 8a de septembro 2019 dum la tuta somero dum 86 tagoj funkciis sur la stacidoma placo de Bielo la tiel nomita Rovert-Valser-Skulpturo, en kies koro troviĝis paviliono de Parzival', kie ĉiu-tage okazis Esperanto-kursoj. SES apogis per ĉeesto de diversaj instruistoj, kaj informmaterialo la tre sukcesan informaktivecon de Parzival'. Plej renoma lernanto de Esperanto dum tiu projekto estis la skulptisto Tomas Hirschhorn. Ni disdonis en la skulpturo inter aliaj materialoj pli ol 2000 ekzemplerojn de diversaj eldonoj de Svisa Espero.



## Lokaj aktivecoj

Lokaj aktivecoj kaj renkontiĝoj okazis en Bazelo (regulaj renkontiĝoj en kunlaboro kun la najbaraj grupoj en Weil am Rhein kaj Alsaco), Belinzono (SES-Tagoj), Berno, La Chaux-de-Fonds (lingva kafejo, studsabatoj de CDELI, plej diversaj aktivecoj en KCE [inter SES kaj KCE bedaŭrinde restas diversaj diferencoj]), Ĝenevo (lunda grupo, Kastaj festoj), Laŭzano (regulaj kunvenoj en salono Dickens, orienta kaj okcidenta studgrupo) Will (diversaj renkontiĝoj en Flawil), Zuriko (monataj kafoklaĉoj en restoracio Mishio).

## Retejo

La Svisa Kalendaro estis regule aktualigita kaj en ĝia arkivo eblas vidi detale, kio tra la jaro okazis en Svislando. En instagramo Didi Weidmann publikigis amzuan filmetan kurseton „Lernu Esperanton kun Superhundo", kiu estas sekvata de plurmil homoj (aktuale 5600 sekvantoj). La lecionoj ankaŭ videblas en Jutubo, Pepanto kaj TikTok.

## 2020 – Korono-krizo

Por 2020 estis planita 4taga renkontiĝo en Zuriko de la 30a de aprilo ĝis 1a de majo. Sed komence de marto la eksplodo de la korona pandemio malebligis dum preskaŭ duona jaro ĉiujn fizikajn publikajn eventojn. UEA, ILEJ kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj reage al tio kreis diversajn virtualajn renkontiĝojn en la reto (Monda Festo, ILEI-konferenco en le Brenets).
La Svisaj Esperanto-Tagoj nun okazos en oktobro en reduktita formo.

Virtualaj konferencoj memkompreneble neniel povas anstataŭ la realajn renkontiĝojn, tamen ni havis ankaŭ tre pozitivajn spertojn, kaj nia societo en estonto devas pli aktive uzi tiun tre bonan instrumenton.

## *La venonta ĝenerala kunveno de Svisa Esperanto-Societo okazos sabaton la 29an de majo 2021 je la 14a horo en Le Brenets kadre de:*

## LES PETITES SCHUBERTIADES DES BRENETS
### *[La etaj ŝubertstilaj muzikludoj en Les Brenets (Eta Ŝubertumado)]*
### Vendrede 28-an, sabate 29-an kaj dimanĉe 30-an de majo 2021.

**Klarigo**: Ekde la jaroj 1820 Franz Schubert kutimis kunveni kun muzikistaj kaj komponistaj geamikoj en diversaj privataj salonoj, kie oni ludis muzikpecojn kaj kantojn. Poetoj ankaŭ miksiĝis por prezenti literaturajn tekstojn, kiuj troviĝas en multaj lidoj (germanaj kantoj de tiu epoko).
Tiuj enaj kaj ĝardenaj eventoj tiom plezurigis homojn, ke tiaj festivaloj organiziĝis en multaj landoj. Hodiaŭ ankoraŭ la Romanda Radio organizas ĉiun duan jaron tiatipan kunvenon kun multaj koncertoj en preciza urbo, loko, dum semajnfino.

**Celo**: kunvenigi muzikistojn, kantistojn, esperantistojn kaj ne esperantistojn. La mencio de Esperanto ne aperos en la franclingva komunikado pri tiu evento. Meti Esperanton en aktivecojn tute normale, simple. Homoj intermiskiĝos spontane.

**Muzikumado**: la koruso provludos kaj kantos, venos aliaj muzikistoj, formiĝos duopoj, triopoj, kvaropoj laŭ la ebloj. Eble kontribuos la vilaĝa koruso. Ĉiuj provludoj estos publikaj. Respondeculo pri la muzika organizado kaj programo estas Elisabeth de Mestral. (de.demestral@bluewin.ch)

**Koncertoj**: Koncerto estas antaŭvidita dimanĉe je la 17-a horo. Eble plia koncerteto okazos sabate vespere aŭ dimanĉe matene.

**Organizado de la lokoj kaj manĝoj**: Mireille Grosjean (mirejo.mireille@gmail.com) Ni havos 5 lokojn tute proksimajn por provludi, provi, ekzerci, improvizi, ĝui komunan muzikadon iel ajn. La fina koncerto de dimanĉo okazos en la katolika kapelo. La partoprenontoj devos anonci sin al Mirejo por povi kune manĝi ekde vendrede tagmeze. La orientsvisaj esperantistoj povos ekveturi el Le Locle dimanĉe je 19 :20 por reiri hejmen, ĉar estos taksio el Les Brenets al Le Locle.

**Tranoktoj**: Ĉiu partoprenonto mem zorgas pri akiro de lito.
Le Passiflore estas malmultekosta hoteleto proksima, tie ni havos salonon por provludi ankaŭ. Grand- Rue 18, 2416 Les Brenets, 032 920 31 15 ; 079 659 81 58 ; www.lepassiflore.ch.
Hotelo ĉe la lago : Les Rives du Doubs, Pré du Lac 26, 2416 Les Brenets, Tel 032 933 99 99 ; contact@rives-du-doubs.ch; www.rives-du-doubs.ch

**Kromaj eventoj**
Plantado de Esperanto-Arbo sabate 29-an de majo 2021 je la 11 :30.
Ĝenerala Asembleo de Svisa Esperanto Societo sabate 29-an de majo je 14 :30.

# ~~24-a Kasta-Festo : Por esperantistoj kaj iliaj geamikoj~~

~~**LOKO: Salon Castafiore, 20 rue Montbrillant, fronte al la parko Cropettes.**~~

~~Post ĉi tiu longa periodo de neesto, la Stelo feliĉas inviti vin~~

~~**sabate la 26-an de septembro 2020** al la **24-a Kasta-Festo.**~~

~~Bonvenaj estas ĉiuj Esperanto-emuloj el la ĝeneva kaj eĉ pli malproksima regiono, sendepende de aĝo aŭ lingvonivelo. La ĉefa celo de la vespero estas, ke la ĉeestantoj malkrovu kaj uzu Esperanton kune kun ĝenevaj esperantistoj.~~

~~Per la Kasta-Festoj, la Stelo volas krei amikajn renkontiĝojn por babilante interŝanĝi, pere de komuna manĝo kaj diversaj prezentoj, pri la lastaj novaĵoj de nia movado.~~

~~**Programo:**~~

~~**18h00:** Ni kune rigardas la lastan filmon de François Randin **"la sekreta vilaĝeto"**, produktita de la Laŭzana Esperanto-Societo.~~

~~**19h00** : Kuna manĝo (kanadeca manĝo). Ĉiu alportas iun manĝaĵon kaj trinkaĵon, kaj ĉio estos kundividita ĉe granda tablo.~~

~~**23h00** : Purigado de la ejo, ĝisoj kaj kisoj.~~


***Bedaŭrinde la 24a Kasta Festo pro la koronvirusa situacio devas esti nuligita. Ni esperas vidi vin por la venonta festo en novembro!***

**Mapo por trovi la lokon de la Kasta Festo:**




## La sekvonta Kasta-Festo okazos la 28-an de novembro 2020 (konsultu la Stelan retpaĝon)

Se vi deziras iun ajn informon pri la Kasta Festo, bonvolu kontakti:
Florence aŭ Jacques Sans, telefone +41 (0)22 349 01 86
aŭ retmesaĝe 1001bornes@gmail.com




(ISBN 978-2-940617-38-8, la libro aperos finde de oktobro 2020, vendoprezo ne jam konata)

Antaŭ cent jaroj forpasis nia granda pioniro kaj fondinto de UEA, Hector Hodler, filo de la konata svisa pentristo Ferdinand Hodler. En partnereco kun SES kaj de UEA la Arkivo Jura Brüschweiler aperigos ĉi-aŭtune libron kun ĝis nun ne konataj leteroj kaj tekstoj de Hodler, el ties postlaĵo konservita en la Arkivoj Jura Brüschweiler. Dum la SES-tagoj ni vespere prezentos filmon pri la estiĝo de tiu verko.

## Kotizoj por SES 2020

| | |
|---|---|
| Plenkreskuloj ek de 30 jaroj | CHF 35.- |
| Paroj ek de 30 jaroj | CHF 50.- |
| Junuloj de 19 ĝis 29 jaroj | CHF 20.- |
| Infanoj ĝis 18 jaroj | CHF 10.- |
| Patronoj | CHF 70.- |
| Nuraj abonantoj de SES informas | CHF 25.- |

Kotizojn pagu al la poŝtkonto de Svisa Esperanto-Societo, 2300 La Chaux-de-Fonds:

Poŝtkonto: 17-581908-4
IBAN CH95 0900 0000 1758 1908 4

Adreso de Svisa Esperanto-Societo:
Poŝtfako 9, CH-2416 Les Brenets

Estraro de Svisa Esperanto-Societo:
Mireille Grosjean + Dietrich M. Weidmann (kunprezidantoj), Luc Allemand (protokolanto, junularo), Sonja Daubercies (estrarano), Oxana Grazhdanova (kasistino)

# Alvoko al pagado de la kotizo por 2020

Karaj membroj

Jam ni troviĝas pro korona prokrasto en la dua duno de la jaro 2020 kaj kaj fine povas okazi la ĝenerala kunveno 2020. Tial estas, se vi ne jam faris, pli ol tempo por ĝiri vian kotizon por la aktuala jaro. La societo povas nur ekzisti kaj fari sian laboron favore al Esperanto, se vi, la mebroj per viaj kotizoj kaj malavaraj donacoj tion ebligas. La kasistino samtempe petas vin, por la kotizado, se vi tion povas, utiligi bank- aŭ poŝtĝirkonton, ĉar por kontantaj pagoj ĉe la poŝtgiĉeto la poŝto deduktas monon de nia konto. Se vi pagas ĉe la poŝtgiĉeto ni tial petas aldoni la sumon de CHF 2.- por kovri tiujn kostojn.

Kun elkoraj salutoj
La estraro de SES

# Svisa Kalendaro

*La svisan kalendaron kun la aktulaj eventoj en Svislando vi trovas rete sub:*

http://www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro)

Helpu, ke via evento estu listigita en la Svisa Kalendaro sendante vian informon al ses-informas@esperanto.ch

**5an de oktobro 2020, lundon**, 20h00, Espace Dickens, rue Dickens 6, **Laŭzano**: **Kunveno de Laŭzana Esperanto-Societo, prelegas M. Antoinette**

**8an de oktobro 2020, ĵaŭdon**, 19h00, Neugarten, Bireggstrasse 26, 6003 **Lucerno** (Buso 4 ĝis Steghof): **Prelego de Dietrich Michael Weidmann en la germana lingvo: „Esperanto zwischen Sprache und Ideal“ (https://www.neugarten.ch/info/)**